

wte

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. 1. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levon;

korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble. Postĉekonto No 1133

Adreso: str. Alabin, 50, SOFIA, Bulgario.

Jaro XVII

Marto-Aprilo 1936


7-8

VIZITU TIRNOVO'N!



Tirnovo, malnova ĉefurbo de Bulgario, kiu laŭ sia ĉarma kaj pitoreska situo estas unika en la mondo.

Samideanoj, vi havos la okazon dum la kongreso vizitiĝin.



Al. Maĝarov.

Tirnov

la urbo de la romantiko kaj la legendoj.

Tie, kie iam altstaris la reĝaj kaj nobelaj palacoj. Kio estas videbla en la stratoj de Tirnovo. La antikvaj restaĵoj kaj la moderna vivo. La vespera aspekto de la malnova bulgara ĉefurbo.

La fremduloj ĝin nomis iam „Reĝo de la urboj“ . . . Dua post Konstantinoplo („Reĝurbo“ bulgare).

Dum 1640-a, kiam la urbo estis jam detruita, unu fremdulo, skribante pri Tirnovo, diras, ke ĝi estas io, kio estas nepriskribebla kaj — prave. La malnova Tirnovo, samkiel hodiaŭ, ravas per sia situo, per sia grandioza panoramo. La reĝoj, fondintoj de la urbo, havis verŝajne akrajn okulojn, kiam esploris la ĉirkaŭaĵon por la estonta ĉefurbo-fortikaĵo.

Starinte sur Kartalo¹⁾ en ilia imago aperas la urbo kun dikaj ŝtonmuroj, altaj batalturoj, palacoj kaj monaĥejoj, kaŝitaj meze de la praarbaroj. Tute ne estas mirinde, kial tiom multaj avidaj manoj sin etendadis por ĝin „liberigi“.

La nunaj tirnovanoj vivas kun la valoro de sia urbo. Nun ankoraŭ ili sin nomas nobeloj!

Tamen la antikva landurbo de Asenreĝoj estas senviva. Sola la rivero Jantra kviete fluas ĉirkaŭ la ruinigita fortikaĵo, akvumas ĝardenojn kaj forportas la malpuraĵojn de la fabrikoj kaj de la kanaloj en la nova urbo.

Vidi Tirnovo'n tage ne signifas vidi ĝin romantika. Vane vi serĉos iun fabelan kadron de rokoj kun fajra orumo pro sunsubiro kaj riveron, lazure blua pro la rebrilo de la ĉielo.

Pli malavara estas Tirnovo vespere: stariĝinta sur Zempare-burún, trans Jantra, mi vidas ĝin ĉirkaŭita per granda fajrarko. Malsupre la fajrarko estas punca. En la malaltajn grandtegmentajn dometojn oni ne lasos la blankan elektran lumon. Tie brulas nur la fulgumitaj petrollampoj. En la mezo la arko estas blanka. La lumo abundas kaj varias. La altaj domoj kaj sonorilturoj sin etendas al Kartalo simile al nigraj silentaj manoj meze de ora-griza brilado.

Kun la lasta sopiro de la tago, la tedeco kaj la stulta imitemo de la solia

ĉefstrato ekvigligas. Kiam la ŝlosiloj en ĉiu rustiĝinta ruĝirmilo de „Makenzen“ sin turnas kaj grincbrue sin fermas la fenestrokovriloj de la metiistaj butikoj, tiam la romantika urbo kvazaŭ reviviĝas. Torento da homoj plenigas la solan ebenon kaj larĝan straton. De la militmonumento ĝis la turistdomo, en la malvarma vespero, la torento zumas, vantas kaj ĉirkaŭenigas sian odoron de malmultekosta odekolono, pudro kaj naftalino . . .

La larĝa gajoplena strato »Makenzen« komencas de Marino-pole (Maria-kampo) kaj trolongiĝas tra la tuta urbo. Sur ĝi estas arigitaj ĉiuj komercaj magazenoj kaj kontoroj, sennombraj kafejoj, kinejo kaj teatro. Ĝi estas la ĉefa komercarterio de Tirnovo.

La turistoj-fremduloj konas nur ĝin. Maldekstre, al Kartalo, aŭ malsupre, al Jantra, la bildo abrupte aliĝas: altaj pluretaĝaj domoj, kunpremitaj unu al alia, sternas siajn fenditajn murojn, kovritaj per ŝimo. Timige mallumas faŭkoj. Hedero sin premas en la porojn de la ŝtonaj masonaĵoj kaj al la detruo depost jarcentoj aldonas ankaŭ la eterne-verdan angoron. La stratoj ne havas trotuarojn. La stratoj mem estas mallarĝaj strioj, apenaŭ du metrojn. Tie-ĉi ne estas veturilgrincado. Vintre kaj somere tio estas la infanĝardenoj de Tirnovo.

Ŝtonŝtupoj serpentumas preter malgrandaj bozejoj, malbonodoraj kvartalaj butikoj, preter malnovaj altaj stratpordoj, inkrustitaj per najloj, kovritaj per hedero.

Mi ree descendas sur la larĝan, gajoplenan straton. Mi pasas preter belarangiĝitaj magazenoj. Klientoj ne estas. La vendistoj vokas de la pordoj — preskaŭ trenas min.

La advokata parto de la strato estas dezerta. La kontoroj malplenas. La advokatoj ludas kartojn en la proksimaj kafejoj

¹⁾ Kartalo estas altaĵo en Tirnovo.

Jen estas la placo antaŭ Cárevec. Mi malsupreniras sur malnova turka pavimo dekstren al Jantra. La malnova banejo ŝprucigas mallarĝajn vaporstriojn tra la ventoltuboj. Klínita sub la premo de jarcen-toj la ŝtona konstruaĵo kvazaŭ primokas per siaj kupoloj-okuloj la renaskitan urbon.

Mi trapasas la ponton Feríz-Beg. Sub mi vagas sportboatoj. Tírnovo fieras per sia akvoparko.

Mi eniras la turkan kvartalon. La domoj estas malgrandaj, malaltaj ĝis la ri-

tagnokte. Eĉ vintre estis vídata ledolaboristoj meze de la jantraĵ glacioj.

Proksíme de la nova ŝtona ponto mi eniras kafejon por revarmetiĝi. La neku-tima por tiu laborotempo vígleco susuris en la kafejo. Laboristoj de ledolaboristoj de la fabriko por kudrofadenoj, de tiu por biero, kaj maljunuloj, kubutapoge sur la tabloj interparolas. Mi ekpartoprenas ilian interparolon. — La malgrandaj tanejoj delonge estas ĉesintaj. La nova ledfabriko tute senpaniĝis ilin. Sed ankaŭ ĝi ne la-



Tirnovo, la lulilo de la esperantismo en Bulgario.

vero mem, kaj plí altaj ĝis la moskeo kaj la lernejo. Tie-ĉi ankaŭ malriĉeco, sed vígleco estas. En la koto kuras malgrandaj infanoj kun turkaj kalsonoj kaj fesetoj. El unu turka kafejo alflugas víbranta turka kanto. Rítme tintas tamburino.

Cárevec solece starigas sian malhelan masívon. Sur ĝia dekstra angulo, kvazaŭ forĵetita ŝtonbloko, alstaras la rekonstruíta citadelo—malliberejo de Balduín Flandra...

Mi revenas al Feríz Beg-ponto. Mi ŝovas mín tra »La fendita roko« al la Āsenkvartalo. La domoj ankaŭ tie-ĉi estas malnovaj, nefortikaj, konstruítaj preskaŭ apud akvo mem. En la kvartalo loĝas laboristoj kaj propretuloj-ledistoj.

Sur ambaŭ bordoj de la rivero Jantra estas vtcigitaj tanejoj. Nun en ilí oni ne plu laboras. La novaj ledfabrikoj saturas la merkaton. Iam la ledlaborejoj laboradis

boras senĉese. La fabriko por kudrofadenoj laboradas intermitante ĉiun duan-trian tagon. La bierfabriko same delonge estas ĉesinta. Nur la oleproduktejo laboras.

Mi provas alparoli. Mi rigardas miajn interparolantojn. Ili estas naskitaj en la fabrikkvartaloj kaj kreskintaj en fetoro de ledolaboristoj, akvo kaj koto. Ili ne estas loĝantoj de la romantika urbo! La urbo de la romantiko kaj de la legendoj hodiaŭ estas konvulsianta, ĝi estas dolortuŝita.

La tago kuras. Antaŭ mi staras kilometroj. Mi eliras la kafejon kun benoj por bona vojaĝo.

Ie trans Cárevec ekmuĝis fabriksireno. Ĝi modulas, sin miksas kun la bruo de Jantra kaj denove apartiĝas draste. Ĝi vokas super la fabela urbo de la romantiko kaj la legendoj, en kiu la romantiko iluzio estas kaj la legendoj — trompo.

Tradukis el bulgara: L. M.

IŜTAR

Ljudmil Stojanov

En krudan landon senkoloran
Iŝtar, diino milda venis —
en landon, kie la doloro
sur ĉies palvizaĝ' mienas,

kaj tra dezertaj sablostrioj
en kor' malvarma sen kompat'
kun la rabiaj hundoj siaj
avide vagas Tiemát;

en landon, kie la obskura
nebul' ensorbas la animojn,
kaj bruligitan la naturon
sekigas la soif' senlime;

kaoso kaj dezerto, kie
regadas en la nokt' sen fin' —
jen tien kun konsol-radíoĵ
alvenis bona la diin';

por elkonduki el mizero,
por al la suna mond' instigi,
maljuniĝintajn pro sufero
senhejmajn ombrojn reĵunigi — —

benita dolĉa la espero!
Kaj tamen en senfina sol'
la mortan landon ŝi observas
en la rigardo sen konsol'.

La vento pelas flavajn fumojn
tra la ĉiel' el griza ŝtono;
la nudaj branĉoj sible zumas
enmeze de ruin-kolonoj.

Elir' ne estas! Nur dezerto!
Nur pluvo antaŭ la okul'!
Kaj super la diin' eterna
nur pendas ŝtona la nebul'.

Trad. Miti

NI

Longa estas nia vojo,
malproksime nia cel'
sed tra nigro kaj malĝojo
nin kondukas hela stel'.

Nek lacecon ni eksentas,
nek maldolĉe malesperas,
nek pro io ni lamentas —
eĉ la mokojn ni toleras.

Ĉar ni kredas, ke la vero,
disŝirita de malam',
reviviĝos sur la tero
en pli forta, ora flam'.

Ĉar ni scias, ke la justo
Ĉiam ĝi protektos nin
kaj kun viglo en la brusto
ni agados ĝis la fin'!

Rimna

VESPERKANTO

Longe forgesita kanto
tremas tra vespersilento;
ĝi plenigas mian koron
per plej sankta pacosento.

Meditante kaj mallaŭte
trans arĝentohelaj lagoj
migras ĝi — al malproksimaj,
longe forgesitaj tagoj...

August Eigner

Svetosiav Minkov

Meznokta historio

Gurdo ludas en la strato de la anti-
kvaĵejoj. Ĝia verda papago purigas siajn
plumojn, malfermas sian bekon, krias
post la preterpasantoj.

Neniu aŭskultas la papagon. Neniu
aŭskultas ankaŭ la gurdon, kiu sufoki-
ĝas pro maljuneco. Ĝi jam perdis sian
memoron kaj pro tio ripetas ĉiam la

saman kanton per malmuntitaj taktoj.

La suno subiras, dronas en alian
landon, ekestas vespero.

Sub la malaltaj tegmentoĵ de la an-
tikvaĵejoj rampas ombroj, la maljunaj
hebreoj reviviĝas kun blankiĝintaj bar-
boj kaj ranokuloj en la mallarĝaj pordoj
de siaj butikoj.

Antaŭ la malgranda butikoj de la antikvaĵisto David Sabataj malnovaj vestoj pendas kiel pendigitaj homoj. Kiam la vento lulas ilin, ili aspektas kiel funebraj flagoj.

Jen frako. Ĝi balanciĝas iel eksterordinare solene meze de la societo de siaj ĉifonaj kunfratoj kaj ĝiaj malplenaj manikoj fleksiĝas en elegantaj gestoj. Oni dirus, ke ĝi penas engantigi siajn nevideblajn manojn. Kiel tiu ĉi vesto venis tien-ĉi? Iam ĝi estis ŝlosita en multekosta vestejo kaj ĝia mastro forigis atente ĉiun polveron de ĝia dorso. Nun? Ho, nun la malfeliĉa frako balanciĝas de mateno ĝis vespero antaŭ la pordo de tiu malpura antikvaĵejo kaj la sunradioj kolorigas ĝin verda. Sur ĝia kolumo estas jam kelkaj grasaj makuloj, ĝia butono estas ŝirita kaj perdita. Ĝi malfermiĝas ĉe ĉiu bloveto de la vento, tiel ke ĝia silka substofa komplete frenezigas la dekstran najbaron.

Kaj tiu-ĉi dekstra najbaro estas el kruda kompakta ŝtofo kun forfrotitaj poŝoj kaj kun grandaj flikaĵoj ĉe la manikoj. De tri paŝoj ĝi brandodoras. Oni rakontas, ke la iama posedanto de tiu-ĉi vesto estis vegetarano kaj filozofo, kiu ekdrinkegis tute neatendite ĉe la fino de sia vivo kaj mortis en *delirium tremens*. Hodiaŭ la ŝtofa vesto heredis multajn kvalitojn de sia mastro, parolas grave kaj kuraĝe pri ĉiuj demandoj kaj ĝi opinias sin mem kiel portanton de iaj novaj ideoj. Pro sia longjara servo sur la dorso de la filozofo, ĝi fariĝis tre nerva, pro tio ĝi vivas en eterna kverelo kun siaj kolegoj, precipe kun la frako kompreneble. La malriĉiĝinta noblulo estas tre racia kaj diskreta por eviti la skandalojn.

La antikvaĵejo — kia stranga azilo! Maljunaj pensiuloj, laboristoj, instruistoj, doktoroj — unuvorte, reprezentantoj de ĉiuj socirangoj. Tie-ĉi ĉiu vivas per la espero, ke hodiaŭ aŭ morgaŭ iu preterpasanto eliros ĝin el la malhela kaŝita butikoj kaj savos ĝin de ĝia malhonora ekzilo. Sed la tagoj forpasas kaj tre malmultaj estas la feliĉuloj, kiuj forlasas la antikvaĵejon. La plimulto restas jarojn sur siaj kroĉiloj, la vento ilin balancas malgaje kaj la tineoj formanĝas ilin senkompate.

Ĉu vi vidas tiun generalan uniformon kun jam malhelaj butonoj kaj epoletoj? Ĝi sidas jam post la Balkana milito kaj neniu konjektas ĝin preni. Nur artaŭ kelkaj monatoj iu polickomisario haltis antaŭ ĝi, turnis ĝin de ĉiuj flankoj kaj foriris, ne dirinte eĉ unu vorton. Jes, la polickomisario ne sciis, ke ĝia moŝto komandis divizion kaj ke ĝi estas kavaliro de multaj ordenoj por braveco.

* * *

La antikvaĵistoj kolektas vestojn kaj forportas ilin en la fundon de siaj butikoj. Tie ili vicigas ilin sur la murojn, spionas tra la anguloj, kvazaŭ volas kapti ion, iliaj okuloj elradias serpentan brildon kaj ŝetas rapidajn rigardojn ĉirkaŭe. Fine la blankbarbaj hebreoj komprenas, ke iliaj trezoroj sidas netuŝite sur siaj lokoj, ili ridetas diable kun dikaj kaj malsekaj lipoj, surmetas ĝisorele sur siaj kapoj dispremitajn ĉapelojn kaj ekiras dorsklininte hejmen. Sed antaŭ ol ekiri, ili ŝlosas bone la antikvaĵejojn kaj baras iliajn pordojn per larĝaj tabuloj kaj feraj stangoj.

* * *

Tiun-ĉi vesperon en la antikvaĵejo de David Sabataj okazis eksterordinara sceno, kiu meritas nian favoran atenton.

La antikvaĵisto ne jam estis ferminta la pordon, kiam la frako saltis de sia kroĉilo kaj elkriis kun sopiro:

— Ankaŭ la hodiaŭa tago forpasis en vana atendo! Dio mia, ĝis kiam ni putros en tiu-ĉi kavoj?

— Paciencon, konsulo! — rediris laborista bluzo, kiu sekvis la ekzemplon de la malesperinta noblulo kaj malsupreniris apud li sur la teron. — Mi sidas tie-ĉi du jarojn kaj, por diri la veron, mi ne sentas min tiel malfeliĉa kiel vi. Eble la kaŭzo pri tio estas, ke mia antaŭa vivo estis, vere, netolerebla. Mi laboris tagon kaj nokton en la malhelaj galerioj de karbminejo kaj nun mi havas la tutan rajton vivi kun la penso, ke mi estas iom pli feliĉa ol antaŭe.

— Ho, jes, la okazo kun vi estas tute alia, — kviete diris la noblulo. — Sed demandu min, kia estis mia antaŭa vivo! Ĉu vi scias, kara, ke ni manĝis kaj trinkis kun la prezidanto de la franca res-

publiko? Ĉu vi scias, ke mi okupis unuan lokon en la baloj kaj la vesperoj aranĝataj en la eŭropaj ĉefurboj de la elito de la societo kaj krome oni konsideris min pargeta kavaliro?

— Li manĝis kaj trinkis kun la prezidanto de la franca respubliko! Fi, diablo ĝin prenu, kia grava persono! — malice alĵetis la ŝtofa vesto de la filozofa, movante siajn manikojn. — Diru al mi tiaokaze, via ekscelenco, kion vi faris, manĝinte kaj trinkinte kun la prezidanto de la franca respubliko? Mi volas diri, kian utilon havis el ĉio-ĉi nia patrujo?

— Kion mi faris? — kriis la aristokrato kaj cedis paŝon malantaŭen. — Kion mi faris? Ho, la signifo de tiu-ĉi senkulpa *soirée* estis tre granda el la vidpunkto de la supera diplomatio! — La frako sopiris kaj daŭrigis per voĉo, sufokita pro alfluo de fiereco: — Jes, tiam per subtila diplomatiarto ni gajnis la koron de la prezidanto de la franca respubliko kaj li ĵuris al mi, ke en estonto li estos unu el la plej bonaj amikoj de nia popolo. Vere, ne pasis multa tempo kaj la nobla franco pruvis, ke lia ĵuro ne estis vana fabelo: laŭ lia insisto la nomo de Bulgarujo estis presita per ruĝa titollitero en la internacia komerca almanako, kiun franca eldonejo dissendis tiutempe en milionoj da ekzempleroj tra la tuta mondo. Ĉu vi komprenas, la franca ministro-prezidanto diris nur unu vorton kaj la nomo de Bulgarujo ekbrilis per ruĝa titollitero antaŭ la okuloj de angloj, nederlandoj, germanoj, amerikanoj, ĉinoj, negroj ktp., se vi volas, nombru la ceterajn naciojn!

— Per ruĝa titollitero! Per ruĝa titollitero! — portiĝis murmuro el ĉiuj flankoj de la antikvaĵejo.

La filozofa estis venkita tutplene. Li retiriĝis kun kaŝita malico apud la malgranda fenestreto ĉe la angulo, eldirante senĉese insultojn.

Sed neniu atentis ĝin. Nun ĉiuj vestoj malsupreniris de siaj kroĉiloj kaj ĉirkaŭis la noblulon, kiu staris fiere kaj nevenkeble meze de la butikoj.

Nur unu sola vesto restis pendi en sia loko, kroĉita sur granda rustiĝinta najlo. Ŝajnis ke ĝi havas nenian deziron intermiksiĝi en la interparoloj de la aliaj.

Tio-ĉi estis tre stranga karnavala vesto: larĝa nigra vesto kun monaĥa kapuĉo el viola veluro. Ĝi sidis longajn jarojn en la fundo de la antikvaĵejo silentema kaj malhela kiel ombro. Ĝiaj dikaj faldoj griziĝis pro polvo, en ĝia kapuĉo loĝis araneoj. La antikvaĵisto mem forgesis kvazaŭ pri ĝia ekzisto. Neniam li eligis ĝin antaŭ la pordo de sia butikoj, neniam li ektuŝis ĝin eĉ per mano. Multaj el la loĝantoj de la antikvaĵejo provis paroliĝi ĝin kaj ekscii ion el ĝia vivo, sed ĝi eĉ unu fojon ne ekparolis. Tage kaj nokte tiu-ĉi nigra vesto sidis kroĉite sur la rustiĝinta najlo — kelkiam nur la vento blovetis tra la frakasita vitraĵo de la fenestro kaj balancis ĝin tute facile. Kaj tiam ĉiuj silentis rigidiĝinte sur siaj lokoj, ĉar ekkaptis ilin malklara timo. Ŝajnis al ili, ke la karnavala vesto malsupreniros la muron kaj preterpasos ilin kiel vivanta homo.

Dum la filozofa staris apud la fenestro, banite en la arĝenta nebulo de la lumo kaj pripensis novajn atakojn al sia malpacema kontraŭulo, la noblulo rakontis antaŭ kelkaj el siaj kolegoj la historion de unu sia vintrumo en Monte-Karlo. Inter liaj aŭskultantoj estis ankaŭ unu helgriza pantalono Charleston, kiu venis antaŭkelkaj tagoj en la antikvaĵejon kaj sentis sin ankoraŭ tre vivĝoja malgraŭ siaj ŝiritaj tibiingoŝoj kaj la granda inkomakulo sur sia dekstra genuo.

— Interesa historio! — incite ekkriis sinjoro Charleston. — Do, vi sukcesis pergajni du milionojn da frankoj?

— Ah, ne rememorigu al mi tion! — malgaje rediris la noblulo. — Mi gajnis ilin por perdi ĉion la sekvantan tagon. Cetere, por mi la mono havas preskaŭ nenian signifon. Oni devis rigardi iomete pli filozofie al la vivo, ĉu vi komprenas?

Nun la vegetarano ne povis resti apatia al tiuj ĉi hazarde interdiritaj vortoj pri la filozofio de la vivo, alpaŝis unu paŝon antaŭen kaj turniĝis per ŝanĝita trankvilo al la noblulo:

— Plej malmulte vi, estimata sinjoro, rajtas paroli pri la filozofio de la vivo! Tiu-ĉi temo estas tute fremda al via mondkoncepto. Jen, vi vivas kelkajn jarojn en la antikvaĵejo kaj, tamen, vi

ne povas kompreni, ke vi estas tute superflua vesto, ke en la hodiaŭa tempo oni havas nenian bezonon pri frakoj. Tiu, kiu konceptas la vivon filozofie, devas vivi kun la saĝa rezignacio pri la signifo de sia estado. Tie-ĉi estas la ŝlosilo de ĉiu filozofio, ĉar ĉiu filozofio naskiĝas el la Nenio.

— Permesu al mi fari al vi malgran dan rimarkon! kriis pantalono el nigra drapo kaj kun apenaŭ videblaj randoj, kiu ĝis tiu-ĉi tempo aŭskultis tute silente la interparolantojn. — Mi venas el la regno de la mortintoj kaj mi opinias, ke la vivo ne estas tiel sensenca, kiel vi volas prezenti ĝin.

— Kiel, vi venas el la regno de la mortintoj? — ekkriis sinjoro Charleston kaj disetendis la krurojn pro teruro.

— Jes, mi kuŝis longajn semajnojn en tombo, ĝiskiam nekonataj ŝtelistoj min elfosis el la tero kaj vendis min en tiu-ĉi antikvaĵejo. Sed tio-ĉi estas tute nekonsiderinda detalaĵo, kiu nun ne devas interesi nin. Do, estimata kolego, — diris la nigra pantalono, turnante sin al la filozofo, — vi riproĉas la sinjoron pri la frivoleco, sed vi mem konceptas la vivon tre nefilozofie. La homo estas io pli ol ordinara karno. Lia ekzisto estas submetita al grandaj mondleĝoj kaj pro tio ĝi ne povas esti nenieca!

— Malsaĝa babilado! Fantazio! — tro memfide rediris la vegetarano.

— Fantazio? — ridete diris la pantalono. Bone, diru al mi, kio estas fantazio?

— Kiel fantazio ni devas kompreni tiun cerban proceson, kiu incitas en nia konscienco neekzistantajn figurojn kaj absurdajn imagojn! — fiere ekkriis la ŝtofa vesto.

— Tute malprave! — rediris la nigra pantalono. — La fantazio estas okulo de la animo. Per ĝi ni vidas la projektaĵojn de la nevidebla mondo. Ĝi estas spegulo de la vizioj kaj ilo de sorĉa vivo — per ĝi ni kuracas la malsanulojn. Jes, Parazelsus... Theophrastus Bombastus Parazelsus kuracis la kapdoloron trans spaco, efikante al tranĉitaj hararoj. „Ĉu vi vidas tiun stelon“? — diris Napoleono al la kardinalo Fech. — „Ne, sir“. — „Bone, mi vidas ĝin“. — Kaj certe, li vidis ĝin, ĉar lia fantazio kune

kun la racio rezultigas la genion. Kaj Napoleono, nedisputeble, estis geniulo.

— Mi ne komprenas vin! — surprizite diris la filozofo. — Pri kia kuracado transspaca vi babilas? Kaj kial vi enmiksas tie ĉi Napoleonon? Eĉ, se ni supozus ke li, vere, vidis ian stelon — kio sekvas? Kion prezentas fakte la stelo? Kian koneksoneĝi havas kun la vivo tie-ĉi kaj kun ĝia filozofio?

— Kiel, kian konekson? Do, vi neas la astrologion, la veran astrologion, kiu bazas sin en la sola universa doktrino de Kabala?

— Kompreneble, mi neas ĝin. Mi preferas la astronomion! — rediris la filozofo.

— Ankaŭ mi! Jen la Granda urso! — ekkriis sinjoro Charleston, alkurante al la fenestro kaj montris tra la vitraĵo la klaran stelriĉan ĉielon.

— Nenio en la naturo estas indifera, — la pantalono daŭrigis, enpenŝinte kaj kvazaŭ al si mem. — Ŝtoneto sur la vojo povas rompi aŭ baze ŝanĝi la sorton de la plej granda homo, eĉ la sorton de tuta imperio. Ankoraŭ malpli indifera povas esti la loko de tiu aŭ alia stelo por la sorto de la infano, kiu naskiĝas kaj kiu de sia naskiĝo eniras en la universalan harmonion de la stelmondo. La steloj estas ligitaj unu kun alia per atraksio, kiu tenas ilin en ekvilibro kaj movas ilin regule tra la spaco. Kompreneble, por legi la skribon de la stelojn, oni devas koni antaŭ ĉio la stelojn mem — kono, kiun oni akiras pere de la kabala zodiako de la ĉielo kaj pere de la kompeno de la kabala planisfero de Gafarel. En tiu-ĉi planisfero la konstelacioj formas la hebreajn vortojn kaj la mitologiaj figuroj povas esti anstataŭitaj per la simbolo de Tarot.

— Aŭskultu, kara! — senpacience ekkriis la ŝtofa vesto. — Ĉio-ĉi, kion vi rakontas, odoras al mi je teozofio, kaj se vi volas, ankaŭ je masonio. En tia okazo superflue estas disputi pri la filozofio de la vivo, ĉar mi havas tute formitan vidpunkton pri tiu-ĉi demando kaj mi ne deziras, ke oni altrudi kiajn ajn doktrinojn pri la senmorteco de la animo.

— Vere! — intermiksitis sin sinjoro Charleston. — Nu, lasu tiujn-ĉi interparolojn! Ĉu ne estus pli bone uzi la tempon por io pli agraba? Atenton: mi

proponas aranĝi inter ni intiman danc-amuzon! Nur, bedaŭrinde, ke tie-ĉi ne estas sinjorinoj.

Incitite pro la subite veninta ideo, sinjoro Charleston alkuris alla muro kaj ekprenis el tie la alkroĉitan malnovan gitaron kun du rustiĝintaj kordoj. Ĝi turniĝis, fleksis siajn piedojn en la takto de amata danco kaj ekkantis senzorge kaj gaje la lastan ĵazbandan ludon, akompanante sian kanton per la terura tintaĉo de la malakordita gitaro.

Tio-ĉi enportis eksterordinaran vigliĝon meze de la tuta societo en la antikvaĵejo. La sonoj de la rustiĝintaj kordoj rompis la ĉirkaŭan songsilenton. Ĉiuj eksaltis el siaj lokoj kaj komencis turniĝi kiel frenezaj. En la malgrandan butikon enkuregis kvazaŭ furioza ciklono, kiu ĵetis kaj turnis per sia tuta forto la malnovajn vestojn. Eĉ la frako kaj la ŝtofa palto forgesis sian eternan malamon kaj portiĝis unu apud la alia. Kaj kelkaj dikaj pensiuloj kun malfortaj koroj balanciĝis kiel anasoj kaj spiris peze.

Nun, kiam ĉiuj fordonis sin al gajeco, la karnavala vesto dekrociĝis el sia najlo kaj malsupreniris unuafoje sur la teron. Ĝi ekstaris kiel fantomo en la fundo de antikvaĵejo kaj ekflustris tute mallaŭte, tiel ke neniu povis aŭdi ĝin:

Ni estas ombroj kaj nia vivo estas ludo de la ombroj. Jaroj forpasos, antaŭ ol ni transiros de karnavalo al eterna estado.

Nur du ne partoprenis la amuzon, sed ankaŭ ili ne aŭdis la profetajn vortojn de la vesto kun la velura kapuĉo.

La teozofa ronkis, kaj la ĝenerala uniformo sidis en truita apogseĝo kaj verkis siajn rememorojn de la milito.

* * *

La blankbarbaj hebreoj ŝtelrigardas kiel ŝtonigitaj monstroj malantaŭ la mallarĝaj pordoj de siaj butikoj kaj okulfermas, dentmontrante al la lumo, kiu mordas iliajn okulojn.

La minutoj turniĝas en la ĉiama ciklo de la kvar sezonoj.

Printempo. Somero. Aŭtuno. Vintro.
La malnovaj vestoj atendas.

El bulgara lingvo tradukis G. H.

XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. (5-18) AŭGUSTO.



XII-A SOMERA UNIVERSITATO
KULTURAJ KAJ EKONOMIAJ PROBLEMOJ DE MEZ-EŬROPO
INTERN. KONFERENCO DE VIRINOJ
VOJAĜO TRA AŬSTRIO
SALZBURG - WIEN - SEMMERING - GROSSGLOCKNER - SALZBURG
ĈARMAJ URBOJ - NEĜKOVITAJ MONTOJ - BLUAJ ALPOLAGOJ - DANUBO
FESTARANĜOJ
KOSTUMBALO: „LA KONGRESO DANCAS“
OPRETO: „LA BLANKA ĈEVALETO“
KONGRESEJO: LA FESTALONEGOJ DE IMPERISTRA KASTELO „HOFBURG“
ADRESO: ESPERANTO-KONGRESO-WIEN-NEUE BURG.

PRI LA „BLANKA ĈEVALETO“

La teatraĵo de la 28-a universala kongreso de esperanto en Wien estas la fama aŭstria opereto „La blanka ĉevaleto“, konata kiel sonanta filmo ankaŭ eksterlande. Ĝi distingiĝas per sia tipe aŭstria humoro kaj serena gajeco. Ĝiaj kantoj estas tre melodaj kaj parolantaj al la homa sento. La muzikan parton komponis Ralf Benatzky, la teksto estas de Hans Müller, kantoj de Robert Tillberg, esperanta traduko de redaktoro Nikolao Hovorka. La loko de agado estas fama gastejo „La blanka ĉevaleto“ en St. Wolfgang en Supra Aŭstrio: ĝi estos vizitata de la kongresanoj parto-prenontaj en la kongresa vojaĝo „Tra Aŭstrio“.

Jen ĝia enhavo: La riĉa berlina fabrikanto Wilhelm Giesecke, facile impulsebla kaj koleriĝema viro, ĵus travivis ekscitoplenajn monatojn. Li produktis amase novaĵon sur la kampo de trikotajoj, nome aĵuritan, suntralasan ĉemizkalsoneton el unu peco, antaŭflanke butoneblan kaj subite li sciigis je sia plej granda teruro, ke lia plej malica konkuranto, la maljuna Sülzheimer ĵetas kontraŭpatenton sur la merkaton: ĉemizkalsoneton same el unu peco, same aĵuritan, sed malantaŭe butoneblan. Antaŭe aŭ malantaŭe, jen la demando

Tiu ĉi fakto kaŭzas en konsekvenco procesojn pro ofendo de l'patento inter ambaŭ firmoj, provizorajn disponojn de l'juĝejo kiel ekzemple sekvestradon de l'fabrikita varo kaj aliajn similajn mal-multe agrablajn sekvojn. Tiel okazis, ke Giesecke urĝe nun bezonas refreŝigon por trostreĉitaj nervoj. Tion pensas ankaŭ Ottilie, lia ĉarma filineto. La ideon, ke Giesecke devas forveturi, sugestis advokato d-ro Siedler. Li estas la advokato de l'kontraŭa partio kaj konas Ottilie de balo dum la pasinta vintro. D-ro Siedler kun plezuro volus ordigi la aferon inter la patro de Ottilie kaj sia komisiinto Sülzheimer—ne pro tute altruistaj motivoj, ĉar li estas forte enamiĝinta je Ottilie. Dume tamen kredas ankoraŭ sinjorino Jozefa Voglhuber, la ĉarma kaj rezoluta mastrino de l'„Blanka ĉevaletto“ en St. Wolfgang, ke ŝia longjara kutima somergasto D-ro Siedler estas forte altirata de ŝia persono. Ŝi atendas lin jam kun granda sopiro, je forta ĉagreno de ŝia ĉefkelnero Leopold, kiu ŝin arde adoras kaj esperas, foje fariĝi posteulo de la mortinta mastro de l'„Blanka ĉevaletto“. Sed sinjorino Jozefa, firme konvinkita, ke d-ro Siedler estas je ŝi enamiĝinta, volas nenion scii pri la amo de sia ĉefkelnero, kaj kiam li, malgraŭ ŝia averto foje ekkuraĝas, konfesi al ŝi sian korinklinon, ŝi faras mallongan proceson kaj eksigas Leopoldon.

La feria sezono en St. Wolfgang

atingis dume sian zeniton, estas konstante treege multe por fari, kaj la sperta, servema kaj moviĝema Leopold mankas en ĉiu angulo kaj anguleto. Ankoraŭ pli malbona fariĝas la situacio, kiam subite alvenas la telegrafa sciigo: Imperiestro Francisko Jozefo alvenas, por ĉeesti la pafistan feston en St. Wolfgang! La mastrino de „Cevaletto“ estas konsternita kaj petas Leopoldon, ke li denove restu. Leopold restas, sed li faras kondiĉojn. Kiel la unuan, tion, ke lia rivalo, d-ro Siedler, devas elloĝigi el la „Blanka ĉevaletto“. Kio restas nun al la mastrino de „Cevaletto“—vole-nevole devas sinjorino Jozefa konsenti kaj rigardi, kiel ŝia favorato, la advokato elloĝiĝas.

La konfuzoj kaj implikoj plialtiĝas plue en vico da ĉarmaj kaj streĉaj epizodoj, ĝis fine ĉio solviĝas kaj finiĝas je ĝenerala kontento: Sülzheimer kaj Giesecke interkonsentas, d-ro Siedler ricevas sian adoratan Ottilie, kaj kiam Leopold, post la forveturo de l'imperiestro, postulas sian ateston pri servado, ŝi skribas ĝin al li jene: „Eksigita kiel ĉefkelnero, akceptita por la tuta vivo kiel edzo.“ Kaj tial por ĉiuj partoprenintoj alvenas la feliĉo.

Ni estas certaj, ke tiu ĉarma opereto kun multaj amuze-gajigaj epizodoj kaj melodiaj kantoj rikoltos grandan laŭdon kaj aplaŭdon de l'tuta kongresanaro. Venu kaj amuziĝu!

ЕСПЕРАНТСКИ НОВИНИ

Известия на центр. комитетъ

